24a Jaro - No 5 (255) Jara Kotiz-Abono Fr. 35,— Majo 1938a

# BELGA ★ ESPERANTISTO

Monata Revuo fondita en 1908a

DIREKTORO:
**Maur. JAUMOTTE**
44, Avenuo De Bruyn
Wilryck-Antverpeno

Oficiala Organo de
Reĝa Belga Ligo Esperantista

Societo sen profita celo. --- Belga Ŝtatgazeto 27.6.35

ANTAŬ NIA JARFESTO.

## Ĉiuj al Charleroi

La jara tutlanda Kongreso, — nia Kongreso —, okazos dum la unuaj tagoj de Junio proksima.

Ni povus do prokrasti, ĝis la sekvanta numero, nian kutiman alvokon al nia ĉiujara Esperanto-festo ?

Ni tamen riskus ke, ĉar la Kongreso okazos dum la unua semajno de la monato, tiu alvoko alvenu tro malfrue, por ankoraŭ decidigi iujn iri al Charleroi.

Ĉar, kiel ĉiuj jam scias, estas en la tiel vivoplena industria urbo de Valonlando, ke okazos, tiun ĉi jaron, la renkontiĝo de la Belga samideanaro.

Sed ĉu vere alvoko kiel la nuna estas necesa. Ĉu vere iuj el niaj membroj bezonas tian alvokon?

Ni kredas: jes! Post Kongreso, dum kiu oni estis feliĉa renkonti amikajn vizaĝojn kaj pasigi kelkajn gajajn horojn en vere familia rondo, ĉiu rehejmiĝas kaj tuj estas rekaptata de la profesiaj okupoj kaj ĉiuspecaj zorgoj.

Kaj la tempoj estas tiom krizaj, ke multaj inter ni, ne trovas multan tempon, por, ekster tiuj okupoj, ankoraŭ multe ĝui la rememorigon de tiuj tro rapide forflugintaj tagoj.

Kaj la tagoj, la semajnoj kaj monatoj forflugas, dum ili ankaŭ ne havis tempon pensi pri la sekvonta jarfesto.

La libertempaj monatoj apenaŭ forpasis, kiam ni jam ree vidas la naskiĝon de nova jaro.

Kaj la Novjaro estas apenaŭ forpasinta, kiam ni jam skribas: Februaro, Marto, Aprilo... kaj tiam subite ni vidas, ke ni staras jam ĉe la antaŭtagoj kaj ke ni ne jam ion preparis.

Ĉar vere oni bezonas preparon por Kongresirado. Oni devas enirigi en si, jam antaŭe, la atmosferon de la Kongreso; oni devas jam antaŭĝui la festojn, dum kiuj oni revidos tiun ĉi kaj tiun vizaĝon amikan, babilos kun tiu aŭ tiu ĉi gaja kunulo; multaj ankaŭ devas prepari la monan flankon, ĉar Kongreso kostas monon.

Ne sufiĉas plenigi aliĝilon. Ankaŭ la monon oni bezonas.

Kaj ni tre bone komprenas, ke, por iuj inter ni, la ekonomiaj cirkonstancoj povas esti kialo por dubi momenton, ĉu vere oni faros la vojaĝon. Kaj al tiuj amikoj precipe ni skribas hodiaŭ.

Al ili ni diras : Kiam vi vidas la prezon de manĝo, de festeno, de ekskurso, ne pripensu ĉu, por vi, laŭ... mi diru « teknika » vidpunkto, ordinara manĝo, festeno aŭ ekskurso valoras tion. Diru... Dum tiu manĝo, mi sidos, dum du aŭ tri horoj, inter tiu kaj tiu alia amiko kaj, kontraŭ mi, ĉe la belornamitaj tabloj, sidos aliaj amikoj, venintaj el aliaj urboj, eble aliaj landoj.

Kaj tiu ekskurso, kiun mi eble jam parte faris kaj kiun mi eble, en aliaj cirkonstancoj, ne refarus tiel, mi nun partoprenos, en tutescepta atmosfero; tiu atmosfero, kiu regas nur en tiuj Kongresoj, en kiuj ĉiuj povas paroli la saman lingvon, kiun ĉiuj komprenas; tiun lingvon kiu, vole nevole, iĝas la lingvo de la koro, la lingvo de la frateco kaj de la amo, inter fratoj de du samlandaj gentoj kaj de ĉiuj gentoj de la mondo.

Jam nun, pli ol cent amikoj enskribiĝis kaj do faris la unuan paŝon per kiu ili volas montri al niaj novaj amikoj en Charleroi, kiuj mem ne jam havis la ŝancon kaj feliĉon partopreni antaŭajn belgajn kongresojn, ke ili fidas plene en ili, ĉar ili scias, ke, ankaŭ ili, estas kaptataj de tiu spirito, kiu jam de jaroj estas nia spirito, la spirito kiu donas al ni la forton, daŭrigi, ĉiutage, la laboron por nia Idealo.

Ke nun ĉiuj ankaŭ zorgu, ke la diversaj mendoj aliru Charleroi, kiel eble plej baldaŭ. Tiu laboro de la kunigo kaj aranĝo de diversaj programeroj, laŭ la mendoj kaj aliĝoj, estas ja unu el la plej malfacilaj kaj delikataj taskoj de organiza Komitato. Ni ĝin do plifaciligu, kiel eble plej.

Sed Kongresojn kun cent personoj, ni jam organizis antaŭ multaj jaroj.

La lastaj jaroj alportis al ni pli grandan rikolton. 1938 devas almenaŭ alporti al ni la saman nombron de partoprenantoj, kiel la antaŭaj.

La sekvanta numero de nia organo, kiu aperos, tri tagojn antaŭ la Kongreso, devas enhavi liston, kiu montras la ciferon 200 !

Al la akiro de tiu ĉi celo, ĉiuj grupoj en Belgujo kunhelpu!

Ne nur ĉiuj grupoj, sed ĉiuj niaj membroj individue, kiuj, pli bone ol grupoj eĉ, povas, per persona, individua konsilado, influi hezitemajn amikojn !

Maur. JAUMOTTE.

# Reĝa Belga Ligo Esperantista

## ORDINARA ĜENERALA JARKUNVENO

**3-an de Aprilo 1938.**

La 3-an de Aprilo okazis, en Bruselo, en « Hotelo Albert », la ĝenerala jarkunveno de la membroj de Belga Ligo. Pli ol 70 membroj partoprenis la voĉdonojn.

Ĉe la estrara tablo, S-ro Kempeneers, prezidanto, estis ĉirkaŭata de la du gevicprezidantoj F-ino Y. Thooris kaj S-ro Maur. Jaumotte, de la kasisto S-ro Tassin kaj de la sekretarioj S-roj Poupeye kaj Swinne.

La sekretarioj kaj poste la vicprezidantoj kaj la kasisto raportis pri la ĝenerala agado de Belga Ligo kaj pri la apartaj fakoj. S-ro Jaumotte kiel direktoro de la revuo, ankaŭ priparolis la situacion de la «Belga Esperantisto».

El la raporto de S-ro Tassin pri la kaso evidentiĝas, ke la kasenhavo malpliiĝis dum la pasinta jaro per Fr. 1.366,50, tiel ke la neceseco pri plialtigo de la enspezoj aperas kiel urĝega. La elspezoj efektive malfacile povas esti malpligrandigataj, ĉar diversaj fakoj povis preskaŭ neniel labori, pro manko je disponebla mono.

Post raporto de la komisaroj, la raporto de la kasisto estis unuanime aprobata.

Rilate al la propagando, grava kaj longa pridiskuto sekvis, vigle enkondukata de S-ro Van de Velde. S-ro Jaumotte, nome de la Instituto, atentigis pri la fakto, ke nia Belga Instituto disponas pri centoj kaj miloj eĉ da ekzempleroj de diversaj propagandaj broŝuroj kaj libretoj, kiuj povas, kiuj ja devus, esti uzataj de la membroj en ilia propagando. Li kontraŭstaras la presadon de novaj propagandiloj kaj rekomendas la uzon de la artikoloj pri- kaj poresperantaj, aperantaj, nun preskaŭ ĉiutage, en iu aŭ alia tagjurnalo de la lando.

La 15 administrantoj, tiel kiel ili estis prezentataj, estis tiam unuanime akceptataj; ili estas: S-roj Faes, Jaumotte kaj Wauters (Antverpeno); F-ino Y. Thooris kaj S-roj Decoster kaj Poupeye(Bruĝo); S-roj Kempeneers kaj Swinne (Bruselo), S-ro Van de Velde (Gento), S-ro Tassin (La Louvière), S-roj Cogen kaj Cafonnette (grupoj kun malpli ol 20 membroj kaj izoluloj); F-ino A. Jennen, S-ro Robert kaj Van den Bossche (kooptaj administrantoj).

La komisaroj S-roj Roost kaj Mathieux estas reelektataj kaj S-ro Alofs estas elektata, por anstataŭi S-ron Robert, kiu iĝis administranto.

Konsiderante la financan situacion de la Ligo, la partopreno de la grupoj en la laboroj de la Ligo, estis taksataj, por 1939, je la jenaj ciferoj:

Ordinara membro: Fr. 20, anstataŭ Fr. 15.

Familia membro: Fr. 7,50 anstataŭ Fr. 5.

Por la izoluloj, la kotizo, kiu jam estis plialtigata antaŭ unu jaro, ĝis Fr. 35, restas senŝanĝa.

## KUNVENO DE LA ADMINISTRANTARO

**3-an de Aprilo.**

Tuj post la ĝenerala kunveno de la membroj de Belga Ligo, kunvenis la nova ĝenerala komitato t.e. la administrantoj kaj la komisaroj. La unua punkto de la tagordo estis la elekto de la membroj de la direktanta komitato.

S-ro Kempeneers, prezidanto, petis formale, ke oni anstataŭu lin, ĉar li tute ne plu estas en cirkonstancoj, kiuj permesas al li plenumi lian taskon, laŭ lia deziro.

S-ro Swinne, sekretario, ankaŭ ne deziras reelekton.

S-ro Tassin, kasisto, kiu jam antaŭe petis, ke oni anstataŭu lin, kiel kasiston, ankaŭ dezirus nun definitive eksiĝi.

S-ro Jaumotte esprimas kiel sian opinion, ke S-ro Kempeneers ja havas ankoraŭ la tempon kaj la intiman emon daŭrigi la laboron de la prezidanteco, se oni konsideras tiun laboron aparte.

Sed pro la fakto, ke antaŭ iom pli ol unu jaro, ni ne plu havas ĝeneralan sekretarion, granda parto de la laboro kaj de la respondeco precipe refalas sur la ŝultrojn de la Prezidanto.

S-ro Jaumotte formale petas, ke oni studu la demandon pri la restarigo de ĝenerala sekretarieco.

Atendante ke, pri tio, oni trovu solvon, li petas ke ĉiuj funkciuloj nunaj en la estraro, restu ĉe l'posteno, kaj ke oni kunvoku poste specialan kunsidon de la administrantaro por solvi la tutan estran problemon.

Principe oni decidas, kunvoki tian kunsidon je la 22-a de Majo. (*)

Se, intertempe, la nuna estraro ne akiris la elementojn, kiuj permesos tian solvon, tiu kunsido okazos post la Kongreso.

La membroj de la juĝantaro estis tiam elektataj.

Sub la prezidanteco de F-ino Jennen, tiu juĝantaro nun konsistas el: S-roj Cogen, Jaumotte, Kempeneers, F-ino Thooris kaj S-ro Van de Velde, efektivaj, kaj S-ro Alofs, F-ino Obozinski kaj S-ro Sielens, anstataŭantaj membroj.

La organizo de la estonta laboro estos temo por la aparta kunsido baldaŭ kunvokota de la administrantaro.

S-ro Robert tiam raportis pri paŝoj, kiujn li faris, nome de la Ligo, en la ministerio de Publika Instruado, rilate la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

S-ro Tassin donis multajn detalojn, pri la Kongreso de Charleroi, sed la loko por la Kongreso de 1939 ne jam povis esti fiksata. Diversaj proponoj tamen jam ekzistas, tiel ke, baldaŭ, la demando povos esti solvata.

(*) Laŭ lasta informo, tiu kunsido ne okazos

## LA KORESPONDAJ KURSOJ

Dum la kunveno de la administrantaro de B.L., administrantoj de « Belga Esperanto-Instituto » raportis pri la jus ekfunkciiĝintaj « Korespondaj Kursoj », organizataj de nia eldona societo.

Intertempe, jam multaj enskribiĝis al tiu kurso, kiu, kiel oni jam scias, kostas nur **Fr. 10,—** kaj estas kompleta en KVIN lecionoj.

La kurso kompreneble ekzistas en ambaŭ naciaj lingvoj kaj kun ĉiu leciono, ek de la dua, la lernanto ricevas la korektitajn taskojn hejme.

Por tiuj, kiuj deziras apartan ensendon de siaj taskoj kaj apartan korektadon, la ebleco ekzistas tion akiri, per krompago de pliaj **Fr. 15.—**.

Ni atentigas ĉiujn propagandistojn pri la ebleco, aĉeti ankaŭ apartajn lecionojn je la prezo de **Fr. 2,—**.

Aĉetante kelkajn unuajn lecionojn, ili do povas malmultekoste instigi konatulojn, amikojn aŭ familianojn al lernado de nia lingvo.

La Instituto, — kaj ankaŭ la Ligestraro —, esperas, ke ĉiuj kunhelpos al la sukcesigo de tiu kurso, kiu devas alporti al nia nacia movado novajn elementojn, kiujn la Instituto direktos al la grupo, plej apuda al la loĝloko de la lernantoj.



# XXVII-a Belga Kongreso de Esperanto

## Charleroi, 4a gis 6a de Junio

### ALVOKO

La 4-a de Junio estas, por Charleroi, solena dato kaj senpacience ĝi atendas la ĝojigan momenton, refoje akcepti, post 27 jaroj, la Esperantistaron.

Por ke tiu akcepto estu brila, oni en la kongresurbo, febre laboras, sen vana bruo, sen fierego, sed, ĉiu estu konvinkita pri tio, senlace.

Pli ol kiu ajn LKK antaŭa, la nuna volas ke ĉiuj tiuj entuziasmaj pioniroj, kiuj, jam de jaroj, laboradas por nia ideo, estu kontentaj pri ĝi kaj ke post tritaga restado, ili forlasu la urbon por porti en tutan Belgujon kaj eĉ ekster la landlimojn, la famon de Charleroi, tiu ĉefurbo de la Nigra Lando, tiu Nigra Lando, kiun tro malmultaj konas.

**Honoraj Prezidantoj:** S-ro Joseph Tirou, urbestro de Charleroi.
S-ro Jules Hiernaux, eks-ministro de Publika Instruado kaj ĝene-rala Direktoro de la Labor-Universitato.

**Honora Komitato:** S-ro Jean Laurent, Distriktestro.
S-ro Georges Dryon, skabeno de Publika Instruado de Charleroi.

**Loka Kongresa Komitato:** S-ro R. Marghem, prezidanto;
S-ro C. Cafonette, vicprezidanto.
S-ro N. Molle, sekretario.
S-ro E. Severin, kasisto.
S-roj G. André, S. Biernaux, L. de Greef, R. Goodwin, E. Pettiau, A. Ringlet, G. Van Veuren kaj J. Waterlot, membroj.

Kun la nuna alvoko, ni havigas programon, nun preskaŭ tute definitiva, kune kun listo de jam pli ol cent Esperantistoj, kiujn vi jam estas certaj renkonti en Charleroi.

Ke vi ĉiu helpu nun pligrandigi, kiel eble plej, tiun nombron, estas nia nepra deziro !

L. K. K.

## Karloreĝo - Charleroi

Por la dua fojo, la Belga Esperant-istaro estas invitata de la Karloreĝa Esperantistoj, viziti ilian urbon.

La unuan fojon, estis en 1911, je la samaj tagoj, la 4-an kaj 5-an de Junio

Estis S-ro Delvaux, prezidanto de la Karloreĝa Grupo, kiu gvidis ĉiujn pre-parajn laborojn, kaj la Esperantistoj estis bonvenigitaj en la urbo mem, de S-roj E. Devreux, urbestro, S-roj De-wandre kaj Rosart, skabenoj, kaj S-roj Duquesne, Dujardin, Roullier, Pélissier kaj Masquelier, urbaj konsilantoj.

La Prezidanto de nia Ligo estis S-ro Van der Biest-Andelhof.

La dimanĉa Di-servo okazis en la kapelo de la Sta. Virgulino de l' Rem-paro, la akcepto en la malnova urb-domo, la fotografado sur la ŝtuparo de la Juĝejo, la festeno en la belega fest-salono de la Borso.

La dimanĉon, la kongresanoj havis okazon viziti la Internacian Ekspozi-cion, kiu okazis, tiun jaron, en Charle-roi kaj la lundon ,la plimulto faris eks-kurson en la ĉarma regiono de Thuin, laŭlonge de la Sambro. Ili vizitis en Lobbes, la orginalan malnovan preĝ-ejon de Sta. Ursmer kaj, post komuna tagmanĝo en Thuin, ili daŭrigis ĝis la rava « Hermitage ».

Tiel finiĝas la 3a Belga Kongreso

***

Malmultaj nur inter niaj nunaj Es-perantistoj povas ankoraŭ memori pri tiu 3a Kongreso kaj, por preskaŭ ĉiuj, kongreso en Charleroi do estas novaĵo.

Ni do prezentu tiun urbon, kiun multaj konsideras, kiel ne vizitinda, ĉar la ĉirkaŭaĵo laŭŝajne devas ĉiam esti nigra.

La urbo mem kalkulas nur 30.000 enloĝantojn sed, kun la multnombraj komunumoj, kiuj iĝis veraj antaŭurboj de ĝi: Montigny, Couillet, Marcinelle, Marchienne, Dampremy, Jumet, Gil-ly, ktp. ĝi estas centro de preskaŭ

ANTAŬ 100 JAROJ

## Ernest Solvay naskiĝis



La 16-an de Aprilo, oni memorigis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Ernest Solvay. Multaj artikoloj en la ĵurnaloj prikantis la memoron de la fama industriisto, de la sciencisto, de la sociologisto kaj de la granda civitano, kiu, en 1914, estis la fondinto de la Nacia Komitato pri Helpo kaj Popolnutrado.

Ni ankaŭ volas, hodiaŭ, alporti nian ŝtonon en tiun memormonumenton.

Ernest Solvay, kies ĉiuj realigoj celis la disvastigon de la instruado, la glorigon kaj plian floradon de la scienco, la socian harmonion kaj la tutmondan pacon, je iu momento, serioze pripensis la avantaĝojn, kiujn alportus al la homaro, internacia lingvo.

Ernest Solvay ne alportis tiam al Esperanto la apogon, kiun multaj esperis. Se lia unuamomenta iniciato, poste ne efektiviĝis, ni devas serĉi la kialon en la disputoj tiamaj, kiuj estis malfavoraj al la necesega unueco ĉe lingvo, kiu permesas al ĉiuj homoj interkompreniĝi.

Sed li okupiĝis serioze pri la tiamaj klopodoj. Lia konvinko pri la utileco de universala lingvo, igis lin, sendi al la kunveno de la Kongreso de Versailles, petadreson, kiu antaŭvidis la akcepton de la franca lingvo, kiel nura oficiala lingvo.

Kun lia spirito, ĉiam realigema li konsideris, ke la emo al perfektigo de instrumento, esence artefarita, devis havi limojn; ke, por ke la klopodoj iĝu utilaj, devis ĉesi la vanaj deziroj pri plibonigo kaj ke oni devis serioze antaŭenmarŝi.

En tiu ekzemplo kuŝas, eble, temo por pripensado, kiun ni ne devas flankenmeti.



La eniro de la urbo.



La nova urbdomo.

duonmiliono da enloĝantoj, centro ankaŭ de intensa laboro.

Sed kontraŭe al multaj aliaj industriaj centroj, Charleroi ne estas nova urbo; ĝi efektive havas historion, ne ampleksan certe, sed sufiĉe movplenan, por ke ĝi konatiĝu kun malfeliĉoj kaj suferado. Ĝia deveno estas malgrava vilaĝo, nomita Charnoy. La hispana reĝo Karolo II, en la jaro 1666, ordonis konstrui tie fortikaĵon, kiu, pro sia fondinto, ricevis la nomon de Karloreĝo (en franca lingvo do : Charleroi).

De 1667 ĝis 1794 ĝi, multfoje, vidis antaŭ siaj muroj, aperi la francajn kaj alilandajn pafilegojn, kiujn kondukis, tra Eŭropo, famaj marŝaloj, kiel Villeroy kaj Boufflers, kaj aliaj ne kompatemaj urbo- kaj kasteldetruantoj. Kruele, ĝi suferis pro diversaj politikaj okazintaĵoj; laŭvice, kliniĝante sub la franca, hispana, aŭstria kaj holanda jugo, ĝis kiam ĝi, fine, trovis pacon kaj kvieton, sekve de la fondo de la Belga Memstareco.

Ĝiaj fortikaĵoj, definitive, estis forigataj en 1868. La lastaj postsignoj de la iama militskuita tempo tiam malaperis, sub la iloj de la terfosistoj.

Se, ĉe l' komenciĝo de la granda milito, Charleroi ne plu estis fortikaĵo, tio ne povis malhelpi, ke ankaŭ, ĉirkaŭ ĝi, batalu la armeoj. Ĝi donis sian nomon al grava batalo de fino de Aŭgusto 1914, kontraŭ la armeoj de von Bülow kaj von Hausen.

Dum la tago de la 23a de Aŭgusto, la urbo defendita de la armeo de Franchet d'Esperey, estis kvinfoje prenita kaj reprenita.

Sed ni revenu al la moderna urbo de la laboro.

El la ĉirkaŭkuŝantaj valoj, supreniĝas la stranga eĥo de konfuza movado, tra kiuj, ĉiuminute, resonas la bruego de rapidantaj vagonaroj, akrasonaj aŭ malklaraj fajfiloj, peze spirantaj maŝinoj. De temp' al tempo la vasta scenejo, subite, enlumiĝas per iom funebra lumo; la tuta ĉielo terure enflamiĝas per malhelruĝa rebrilo: laborejoj, kamentuboj, terkarbamasoj, ĉi tiuj atestantoj de malfacila, nelaciĝanta laboro, aperas en sia malgaja sovaĝa grandeco.

Ĉirkaŭ Karloreĝo loĝas diversspecaj industrioj, kies famo etendiĝas ĝis en la plej malproksimaj landoj de la terglobo. Altaj fornoj, ferfabrikejoj, vitrofarejoj, terkarbeltirejoj, maŝinkonstruejoj ktp. igas la Karloreĝan regionon unu el la plej agemaj kaj gravaj laborejoj de la mondo.

La riĉeco de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kompreneble rebrilas sur la ĝeneralan aspekton de la urbo kaj sur la vivmanieron de ĝia enloĝantaro.

Dum la lasta duonjarcento la urbo mirinde plivastiĝis kaj plibeliĝis. Karloreĝo ŝuldas sian prosperecon al industrio kaj komerco. Tiuj du neelĉerpeblaj fontoj de riĉeco karakterizas ĝian vivon.

Tion la vizitontoj ekvidos tuj kiam ili promenados tra la urbo.

**LISTO DE LA KONGRESANOJ:**

1. S-ro Maurice Jaumotte, Antverpeno
2. S-ro Paul Kempeneers, Bruselo.
3. F-ino Yvonne Thooris, Bruĝo.
4. S-ro André Tassin, La Louvière.
5. S-ro Charles Poupeye, Bruĝo.
6. S-ro Léon Cogen, Ninove.
7. S-ro Hector Boffejon, Antverpeno.
8. S-ro Aug. Faes, Antverpeno.
9. S-ino Frans Schoofs, Antverpeno.
10. F-ino Antoinette Jennen, Bruselo.
11. S-ino Marguerite Jaumotte, Antverpeno.
12. S-ino Kempeneers, Bruselo.
13. S-ino Léon Cogen, Ninove.
14. S-ino Marg. Boffejon, Antverpeno.
15. S-ino Lucette Faes, Antverpeno.
16. S-ro Louis De Hondt, Antverpeno.
17. S-ino Jeanne De Hondt, Antverpeno.
18. F-ino Maria Jacobs, Antverpeno.
19. S-ro Gust. Vermandere, Antverpeno.
20. S-ino José Vermandere, Antverpeno.
21. F-ino Jeanne Loquet, Antverpeno.
22. S-eto Roger Jaumotte, Antverpeno.
23. S-eto Willy Boffejon, Antverpeno.



La laboruniversitato.



La naskiĝejo Reĝino Astrid.



24. S-ro Léon Schoofs, Antverpeno.
25. F-ino Cécile Faes, Antverpeno.
26. S-ro Jan Faes, Antverpeno.
27. S-ino Félicie Staes, Bruselo.
28. F-ino S. Obozinski, Bruselo.
29. F-ino Angelet, Bruselo.
30. S-ro Lode Bas-Carey, Bruselo.
31. S-ro Van der Hecht, Bruselo.
32. S-ro De Waard, Rotterdam.
33. S-ino Romanie Petiau, Gento.
34. F-ino Juliette Nachtergaele, Gento.
35. S-ro R. Groverman, Gentbrugge.
36. S-ro Van Roye, Bruĝo.
37. S-ino Van Roye, Bruĝo.
38. S-ro Verplancke, Bruĝo.
39. S-ino Verplancke, Bruĝo.
40. S-ro Roland Bonge, La Louvière.
41. S-ro Jules Bonge, La Louvière.
42. S-ro Swinne, Bruselo.
43. S-ro Georg. Van den Bossche, Antverpeno.
44. S-ro Raymond Marghem, Marcinelle-Charl.
45. F-ino Ida Brassine, Lodelinsart-Charleroi.
46. S-ro Eugène Allard, Charleroi.
47. F-ino M.-L. Bouxain, Marcinelle-Charleroi.
48. S-ro Fernand Penninck, Walcourt.
49. S-ro Marc Delforge, Charleroi.
50. S-ro Lucien Vanremortere, Charleroi
51. S-ro Camille Cafonnette, Walcourt.
52. S-ro Jean Conard, Charleroi-Couillet
53. S-ro Raymond Paulus, Charleroi.
54. S-ro Victor Demoulin, Charleroi.
55. S-ro Jules Waterlot, Charleroi-Marcinelle.
56. F-ino Dorsinfang, Namur.
57. F-ino Dorsinfang, Namur.
58. S-ro A. Lodema, Antverpeno.
59. S-ro Tassin Filo, La Louvière.
60. S-ino Tassin, La Louvière.
61. S-ro Ch. Schmitz, La Louvière.
62. S-ro H. Dejosse, La Louvière.
63. S-ino H. Dejosse, La Louvière.
64. S-ro Emile Jacques, La Louvière.
65. S-ro Edgard Jacques, La Louvière.
66. S-ro Maurice Wauters, Loveno.
67. S-ro Jürgen Jacobsohn, Bruselo.
68. S-ino Margot Jacobsohn, Bruselo.
69. S-ro Hector Castel, Ganshoren.
70. S-ino Lucy Castel, Ganshoren.
71. S-ro Ernest Pierre, Etterbeek.
72. S-ino Ernest Pierre, Etterbeek.
73. F-ino Madeleine Pierre, Etterbeek.
74. F-ino Bottin, Ixelles.
75. S-ro Nyssens, Ixelles.
76. F-ino Nyssens, Ixelles.
77. S-ro Jules Alofs, Woluwe-St. Lambert.
78. S-ino Gabrielle Poupeye, Bruĝo.
79. S-ro Charles Decoster, Bruĝo.
80. S-ino Laurence Meeuws, Bruĝo.
81. F-ino Marguerite Huyghe, Bruĝo.
82. S-ro Paul Benoit, Oostduinkerke.
83. F-ino Cécile Volckaert, Bruĝo.
84. S-ino E. van Vooren de Milliano, Bruĝo.
85. F-ino Madeleine Devos, Bruĝo.
86. S-ro Henri Delcloo, Bruĝo.
87. S-ro Cycil H. Bingham, Londono.
88. F-ino Barbara Bingham, Londono.
89. S-ro René Curnelle, Marcq-en-Baroeul.
90. S-ro Paul Blaise, Morden (Surrey).
91. F-ino Cécile Willems, Bruĝo.
92. F-ino Madeleine Willems, Bruĝo.
93. S-ro André Cornet, Charleroi.
94. S-ro Nestor Molle, Charleroi.
95. S-ro Emile Severin, Charleroi.
96. S-ro A. Degueldre, Merbes-le-Château.
97. S-ro Reuben Goodwin, Charleroi.
98. S-ino Tasse, Merbes-le-Château.
99. S-ro H. Moy Thomas, Londono.
100. S-ino Simone Alofs, Woluwe-St. Lambert.
101. S-ro André Alofs, Woluwe-St. Lambert.
102. F-ino Mathilde Hofkens, Antverpeno.
103. S-ro Ach. Wauters, Antverpeno.
104. S-ro Emile Pettiaux, Jumet-Charleroi.
105. S-ro Louis De Greef, Charleroi.

# Programo

**SABATON 4-an DE JUNIO.**

14.00 h. Malfermo de la akceptejo en « Passage de la Bourse ».
17.00 h. Laborkunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista.
20.00 h. Intima kaj interkonatiga vespero en la salono de la Borso. S-ro Blaise parolos pri Londono kun lumbildoj. Teatraĵeto. Interme

**DIMANĈON 5-an DE JUNIO.**

9.00 h. Ekster programo :
Katolika Di-servo en la preĝejo « Saint-Antoine » kun prediko Esperanto de Pastro J. De Maeyer.
Protestanta ceremonio en salono de « Cercle Polyglotte ».
10.00 h. « Passage de la Bourse » : Kongresa kunsido. Ĝenerala kunveno Reĝa Belga Ligo Esperantista.
11.00 h. Oficiala akcepto de la urbestraro. Vizito de la nova urbdomo.
12.00 h. Fotografado de la Kongresanoj.
Vizito al la monumento de la Militmortintoj. Flordemeto.
12.30 h. Komuna tagmanĝo ĉe la « Hôtel de l'Espérance ».
14.00 h. Ekskurso al la « Usines de la Providence », en Marchienne-au-Po
Tiun ekskurson povos partopreni maksimume 75 kongresanoj, k pro la danĝero, kiun ĝi prezentas, nur sinjoroj estos allasat Gvidataj de du teknikistoj, oni vizitos la diversajn fakojn de uzinoj.
Dume : la sinjorinoj kaj la sinjoroj, kiuj ne partoprenas la vizit de tiu uzino, havos la okazon viziti, grupe kaj kun gvidanto famkonatan Labor-Universitaton, ĝian muzeon kaj la subteraĵo de la malnovaj fortikaĵoj de la urbo.
20.00 h. « Passage de la Bourse » : Festeno.
Poste : grandioza balo kun bonega orkestro. Specialaj dancnumer Baleto de la dancistinoj de la Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista. Kantoj ktp.

**LUNDON 6-an DE JUNIO.**

9.00 h. Granda tuttaga ekskurso, pri kiu pliaj detaloj sekvos, sed kiu grandaj linioj, kondukas :
de Charleroi al Couvin ;
de Couvin al Chimay; kun haltoj en Bruly, Cul-des-Sarts, Nim lette, La Trappe (kun vizito de la abatejo), Forges.
Chimay : Akcepto de la urbestraro ; komuna tagmanĝo (je fr. 1 antaŭtagmanĝoj; viando, terpomoj kaj legomoj; deserto; biero akvo; trinkmono enkalkulita). - Vizito de la Kastelo kaj promena al la lagetoj de Virelles.
Reveno de Chimay al Charleroi.
Disiro.

**Atentu !** La Kongresanoj, kiuj alvenas unuope en Charleroi, estas petataj rekte, al la sidejo de la « Cercle Polyglotte », Passage de la Bours kie ili estos akceptataj.
Por iri al Charleroi, oni forveturu el Bruselo (Suda Stacidom Vagonaro foriras ĉiuhore je la 7a, la 8a, la 9a ktp. kaj kondukas vojaĝantojn al Charleroi en 42 min.

**Ni memoru ! La adreso de la sekretario de la L.K.K. estas : S-ro Nest Molle, 55, Rue de la Montagne, Charleroi. La numero de P.Ĉ.K. de la Belga Kongreso de Esperanto estas N-ro 1119.1 Charleroi.**

# BELGA KRONIKO

## GRUPA KALENDARO :

ANTVERPENO. — **Reĝa Esperanto-Grupo « La Verda Stelo ».** — Kunvenejoj « De Witte Leeuw », Frankrijklei, 4, Avenue de France, kaj: Lge Leemstraat, 127, Lge Rue d'Argile: ĉiusabate je 21a h. (Perfektiga kurso je la 20a h.)

La 7-an de Majo, en « Witte Leeuw »: Parolado de S-ro Edg. De Coster pri « Luksemburgo ».

La 14an de Majo, en restoràcio «Budapest», Avenuo de Francujo 50, je la 20-a horo, monata komuna manĝo.

La 15-an de Majo, ekskurso al Ste. Mariaburg. Kunveno, je la 10-a h., Victorieplaats. Forveturo per elektra tramo, akurate je la 10 h. 10.

La 21an de Majo, en la « Esperanto-Domo », Societaj ludoj.

La 28-an de Majo, en « Witte Leeuw », Kabaredvespero, estrata de F-ino M. Jacobs.

BRUĜO. — **Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo.** — Ĉiumarde, je la 20-a. — SIDEJO: « Gouden Hoorn-Cornet d'Or », placo Simon Stevin, tel. 314.59.

KUNVENEJO: « Salonego Brangwyn », ĉe S-ano Jéhansart, placo Simon Stevin, Tel. 318.23.

Kunvenoj dum majo 1938, ĉiuj en la kunvenejo:

Mardon 3-an: a) Legado kaj klarigado de B. E. (Prez. Ch. Poupeye); b) Humoraĵoj (Prez. S-ro G.E. Guillaume).

Mardon 10-an: a) dikto de kanto (Prez. F-ino Y. Thooris); b) Esperantaj kartludoj kaj intima babilado (Prez. S-ro H. Van Roye).

Mardon 17-an: a) 6-a leciono de la kurso por progresantoj (Prez. F-ino Y. Thooris); b) Kantado. Gvidos: S-ino J. Groothaert aŭ F-ino A. Boereboom. Piano: S-inoj Poupeye aŭ Van Roye.

Mardon 24-an: a) 7-a leciono de la kurso por progresantoj (Prez. S-ro Ch. Poupeye); b) Kantado (kiel supre).

Mardon 31-an: a) antaŭkongresaj aranĝoj (Prez. F-ino Y. Thooris); b) Portretludoj (Prez. F-ino M. Vanden Berghe).

N.B. — La grupa BIBLIOTEKO estas malfermata ĉiumarde de la 19.30-a ĝis la 20-a, en la Sidejo, Bibliotekistoj: S-ro Karel Decoster kaj F-ino M. Vanden Berghe. Tie ankaŭ samtempe: vendado kaj mendado de esperantaĵoj: libroj, steloj, poŝtkartoj, skribpapero, ktp.

HELPA VENDEJO de esperantaĵoj ĉe F-ino M. HUYGHE, Potterierei, 1, quai de la Poterie. (Helpa Poŝtoficejo.) Tel.: 315,61.

BRUSELO. — **« Esperantista Brusela Grupo ».** — Kunvenejo: « Hotelo Albert I », Placo Rogier, 10, ĉiulunde:

De la 7a ĝis la 8a: Dancleciono.
De la 8a ĝis la 9a: Kurso.
De la 9a ĝis la 10a: Kunveno.

La kunvenoj komenciĝos per kvinminuta perfektiga kurso.

Lundon, la 2-an de Majo: Ludvespero direktota de F-ino Kestens.

Dimanĉon, la 8-an: Promenado laŭlonge de la rivereto Woluwé. Foriro je la 14.30 de Avenue de Tervueren, Ponto de Woluwé. Tramservoj: N-roj 29, 31, 39, 40, 41, 45.

Lundon, la 9-an: S-ino Derks parolos pri « Kuirarto ».

Lundon, la 16-an: S-ro J. Baruch parolos pri « La Folkloro de la Finnaj Popoloj » kun lumbildoj.

LUNDON, la 23-an: Kantvespero, gvidota de S-ro Van der Stempel.

Lundon, la 30-an: Parolata ĵurnalo: Direktorino S-ino Plyson.

GENTO. — **« Genta Grupo Esperantista ».**

Lecionoj en la lernejo St. Pietersnieuwstraat, 45, ĉiumerkrede je la 7-a vespere.

## GRUPAJ RAPORTOJ.

**ANTVERPENO. — Reĝa Esperanto-Grupo « LA VERDA STELO ».** — La 2-an de Aprilo, S-ro F. Swinne, sekretario de « Belga Ligo » faris interesplenan kaj dokumentitan paroladon pri « La libera Ekonomio » en la Esperanto-Domo. La paroladisto rikoltis meritintan sukceson, pro siaj klarigoj. Post la parolado la gemembroj gustumis la «plej malmultekostajn» bombonojn « rekte el la fabrikejo », afable disdonitajn de S-ro Swinne.

La 9-an de Aprilo en « Witte Leeuw » okazis Printempa vespero, en kiu kunlaboris diversaj gemembroj per kantado, deklamado kaj pianoludado.

La 16-an de Aprilo, areto da gemembroj ĉeestis la intiman kunsidon en «Witte Leeuw». Por la antaŭpaska vespero, ne okazis oficiala kunveno.

Pli ol dudek personoj, partoprenis nian komunan manĝon ,la unuan post la ŝanĝo en la mastrumado de la antaŭa « Zenith », nun « Budapest ». Kelkaj el la ĉeestantoj gustumis la hungarajn specialaĵojn, kiujn ni ĉiuj mendos la 21an de Majo.

**BRUĜO. — Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo.** — Kelkaj vortoj ankoraŭ pri la intima festo, kiu okazis la 20-an de Marto en «Eendracht-Uion ». Ĝin ĉeestis pli ol cent kvindek gemembroj kaj familianoj. La programo entenis multnombrajn numerojn de kantado, muzikado, dancado kaj teatroludado. Ĉiuj bonege sukcesis kaj la kunlaborintoj — jam nomitaj en nia antaŭa numero — meritis ĉiuj senrezervajn laŭdojn. La disdono de la atestoj pri lernado al la ekzameniĝintoj, kies nomoj aperis en nia marta numero, estis farata de la Honora Vicprezidantino S-ino M. Algrain, kiu anstataŭis kaj senkulpigis la Honoran Prezidanton, S-ron Dervaux — malhelpatan pro malsano, sed nun feliĉe resaniĝintan — kaj esprimis gratulojn al la sukcesintaj gelernintoj kaj dankojn al la sindonemaj kursgvidantoj: F-ino Y. Thooris kaj S-ro Ch. Poupeye. — Kiel sekvo de tiu memorinda festo, kelkaj grupanoj, instigataj de la granda sukceso de la «Bruĝaj Banjo-ludantoj», nuntempe klopodas starigi propran banjo-sekcion en la grupo. Al tiu novnaskiĝanta sekcio ni deziras fortan kreskadon kaj estonte brilajn sukcesojn.

La 22-an de Marto, S-ro Van Roye donis specialan lecionon pri « Sia », post kio F-ino M. Vanden Berghe gvidis triopan babiladon kun posta publika raportado pri la priparolitaj temoj.

La 29-an de Marto, F-ino Thooris donis lecionon pri la nombroj. Post tio, S-ro J. Drubbel interesplene paroladis pri « Bruĝo, arta urbo nomata Norda Venezio ». S-ino Y. Vrielynck, kunvena prezidantino prezentis kaj, je la fino, dankis nome de ĉiuj la simpatian parolinton.

La 5-an de Aprilo S-ro Poupeye gvidis la legadon de B.E. kaj donis la necesajn klarigojn; S-ro Joan Lockna, Estona samideano, parolis pri sia lando. S-ro Poupeye dankis la parolinton, kiu sukcesis konatigi iom pli la ĉeestantojn kun lia ankoraŭ malmulte konata hejmlando.

La 12-an de Aprilo, la valona kanto « Ni kuniĝu du », esperantigita de S-ro Alofs, estis klarigata de F-ino Thooris kaj reskribata de ĉiuj en la kantrepertuaron. La dua punkto de la programo estis: « Konfeso ». Tiu estis agrabla ludo organizata de S-ro Van Roye. La sorto indikis kiel konfesantojn, F-inon Alphonsine Geers kaj S-ron J. Roose. Ambaŭ kuraĝe respondis la diversajn demandojn, ĉu embarasigajn, ĉu maldiskretaj, skribe kaj sekrete faritajn de ĉiuj ĉeestantoj. Ĉiuj bonege ridis kaj la du viktimoj ne malpli ol la aliaj.

Kvara leciono de la kurso por progresantoj estis farata la 19-an de S-ro Ch. Poupeye, kiu parolis pri la verboj kaj speciale pri iliaj kunmetitaj tempoj. Pro malfrua alveno de la muzikaĵo de « Ni kuniĝu du », la lernado de tiu kanto devis esti prokrastata. Anstataŭe S-ro Joan Lockna, jam nomita, antaŭlegis amuzan rakonton el sia militista vivo, titolitan « La moko de l' sorto ».

**BRUSELO. — Esperantista Brusela Grupo.** — La 7-an de Marto: S-ro van der Stempel gvidis tre amuzan kantvesperon.

La 13-an de Marto: Dum tre bela dimanĉa posttagmezo, la grupo ekskursis, laŭlonge la kanalon al Anderlecht, sub la gvido de F-ino Kestens. Multaj anoj ĉeestis kaj tiuj, kiuj ne ĉeestis malpravis.

La 14-an de Marto: La Prezidantino F-ino Jennen parolis pri Tripoli. Per klara vorto kaj belaj lumbildoj, ŝi prezentis tiun interesan landon.

La 21-an F-ino Kerkhofs amuzis kaj interesis la ĉeestantojn per « Malgrandaj problemoj ». Plezuro estis por ĉiuj trovi la solvojn

La 28-an S-ro Jacobsohn parolis pri « Elektro ». Li klarigis pri la plej diversaj elektraj aparatoj. La parolado estis akompanita de lumbildoj kaj ĝi estis tre interesa. S-ro Jacobsohn havis grandan sukceson.

**GENTO. — Genta Grupo Esperantista.** — La 6-an de Aprilo, okaze de la estonta Kongreso en Londono, Sinjorino De Rijcke helpprezidantino de la Grupo, faris, en « Melomanen », Savaenstraat, paroladon, kun lumbildoj pri « London ».

Post utilaj sciigoj por vojaĝontoj, S-ino De Rijcke, montris tridek kvin vidindaĵojn de la ĉefurbo de Anglujo, priskribante lerte je historia vidpunkto. Ĉiuj ĉeestantoj estas dankemaj al la paroladintino; eĉ ne esperantanoj komprenis pro la klara elparolado kaj pro la helaj lumbildoj, afable pruntedonitaj de la ambasadorejo de Anglujo al « Genta Grupo ».

### KONDOLENCOJ.

— Al F-ino Maria MAHIEU, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ŝia patro, 21-3-38.

— Al S-ro Jozef TANGHE, membro de la Bruĝa Grupo, pro la morto de lia patrino, 4-4-38.

### GRATULOJ.

— Al Ges-roj Florentin LANGOUCHE-HOEREE, gemembroj de la Bruĝa Grupo, pro naskiĝo de filineto: Marie-Jeanne, 14-3-38.

— Al F-ino Germaine VERPLANCKE, membrino de la Bruĝa Grupo, pro sukcesplena ekzameniĝo en Bruselo, pri pianofortludado.

# Lando de Charleroi (*)

## Loka kanto de nia kongresurbo en 1938

1.

De l' urbegoj ja min
Tuŝis granda l' beleco
Ĉar admiris mi ĝin
En palacbrilegeco.
De ĉiu monument'
Min frapis la strukturo
Sed restis sopirsent'
Pro l' verda hejmnaturo
Sub la printempa vent'.
REKANTAĴO.

2.

Sub herbeja verdaj'
Preter la Sambrobordo,
Sub ridanta l' branĉaj'
Kun de l' birdkant' l' agordo,
Profunde en la ter'
Elfosas laboristoj
La karbon. Kun sufer'
Penadas la ministoj
Por nia landprosper'.
REKANTAĴO.

3.

Ŝatas mi ĉe l' forneg'
Flaman noktan ĥaoson
Dum martel' kun brueg'
Ĉie frapas l'amboson.
Impresas de l' minej'
La laboristkuraĝo;
Min emocias plej
La ĝojo de l' vilaĝo
Dum kant' de l' laborej'.
REKANTAĴO.

4.

Lumo de la minej'
En vespera la horo
Aŭ la flam' de fandej'
Tuŝas min en la koro.
Ĉe l'arda vitropec'
Laboras pro l' salajro
Vitrist' kun fierec'
Kantante antaŭ l' fajro
En ĝoj' pri l' liberec'.
REKANTAĴO.

5.

Ĉe la granda kunest'
Dum la ripozotago
Min ĝojigas la fest'
De l' minist' post la pago.
Biero tie ĉi
Fluadas en amasoj;
Saŭmokraketas ĝi.
La bruon de la glasoj
Dum kanto ŝatas mi.
REKANTAĴO.

REKANTAĴO.

Ĉin, land' de Charleroi,
Preferas mi en vero;
Bela plej de la tero
Ci por mi estas ja. (bis)

Kanto de la karloreĝa popolkantisto JACQUES BERTRAND. Permesita esperanta traduko de Jules Alofs. Muziko kun franca teksto, kun aŭ sen akompano, havebla ĉe PASQUE et CHRISTIAENS, 5 Passage de la Bourse Charleroi.

(*) Elparolu: « Ŝarlerua ».



## INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

Jarlibro 1938. 349 p. 11,5 x 15,5 cm. Kun blukolora belaspekta kovrilo nia jarlibro aperis, laŭ promeso, en la lastaj tagoj de Marto. Resumi la enhavon ni ne povas en tiu ĉi loko, ni nur volas atentigi ke IEL faris jam grandan paŝon antaŭen, eldonante jarlibron kiu ampleksas preskaŭ 100 paĝojn pli ol la pasintjara « ora » jarlibro. Ĝi enhavas multajn interesplenajn informojn kaj la adresaron de 1107 reprezentantoj en diversaj lokoj.

La jarlibro ne estas aĉetebla sed ricevebla nur por individuaj membroj de IEL. Kotizoj MJ. Fr. 20; MA. Fr. 50; MAH. Fr. 128; MS. Fr. 175. Interesitoj petu informojn pere de la loka grupo aŭ rekte al Belga Ligo Esperantista.


# Atentu

Esperantistoj, por viaj poŝtkartoj, tabako, cigaroj, direktu vin al
« M A I S O N   G R U S L E T »
— **Avenuo Astrid, 18** —
**G E N T O**

# Anoncetoj

*Turnu vin al samideanaj firmoj*

### EN BRUĜO

**ALGRAIN-COUCKE,** 23, Vlamingstr. rue ...mande. Tel. 334.24. Nuntempaj Novaĵoj ... sinjorinoj kaj knabinoj.

**DE GUCHTENEERE, J.** « Agence Mari... Minne», Komvest, 44, Ŝipmaklero, Transp... Eldoganigo, Asekuro, Tel.: 334.22.

**FOTO BRUSSELLE,** Steenstr., 41, rue ... Pierres. Tel.: 334.11. Fotografado indu... Foto-Kino-Aparatoj, Akcesoraĵoj, laboroj...

**M. HUYGHE,** Potterierei, 1. Ilustritaj p... kartoj, ĉiuspecaj memoraĵoj pri Bruĝo. H... Poŝtoficejo. Tel.: 315.61.

**Antoine POUPEYE,** Dampoortstr. 23, St-K... Tel.: 314.61. Ĉiuj asekuroj en la tuta lan... Informoj sen devigo.

**PH. MICHOLT,** Koningenstr., 7, Rue des R... apud Preĝejo S-ta Walburgo. — Ro... manteloj.

**SABBE-DE VEEN,** Steenstr. 76, Rue des P... res. Tel.: 330.48. Floroj-Agento de « Fleur... n-ro 669.

**VOLCKAERT,** Geldmuntstr. 30, Rue de... Monnaie. Tel.: 336.07. Porkaĵoj, Ĉasaĵoj, b... birdaĵoj.

**V-ino van VOOREN de MILLIANO,** A... demiestr. 11, Kukejo. Fabrikejo de veraj ... landaj biskvitoj.

**VAN DE VENNE,** Bouveriestr., 59, Skulpti... tombŝtonoj. Blankaj kaj bluaj ŝtonaĵoj.

**SALONEGO BRANGWYN,** S-ano Vital Jéha... sart, placo Simon Stevin, Kunvenejo de ... G. E. — K a f e j o — H o t e l o. Esperanto parolata.

**STROOBANDT,** Vlamingstraat, 13-15, R... Flamande (Tel. 334.08). — Enlandaj ŝin... kaj lardoj. Trufitaj galantinoj; famkona... pasteĉoj de grashepataĵo.

**EMIEL MESTDAGH,** Moerkerksche steenw... 113, St. Kruis: Tapetisto, murpaperoj, ... piŝoj, drapiraĵoj, seĝegoj.

### EN LA LOUVIERE

**RENE FALISE,** librovendejo, 10, strato Alb... I-a; ĉiuj klasikaj, teknikaj, literaturaj ... ESPERANTISTAJ libroj de ĉiuj aŭtoroj ... eldonistoj.

**AŬTOMOBILEJO C. WINS-MEUNIER,** ... Haltejo. — Riparejo kaj zorga servado ... Nokte kaj tage. — Tel. 282 k. 1270.


# POR KORESPONDEMULO

Legiano Wilmotte Oscar, 6839, Clique 4 R... Camp Mangin, Marrakech, Maroko, dezir... korespondi kun esperantistino.


**La esperantistaj gepatroj donas al siaj infanoj :**

# " PAIDOPHILE SIROPON "

**kontraŭ tuso, kokluŝo, febro, ...**
— **Mirindaj rezultatoj** —
**En ĉiuj apotekoj: 7 kaj 12 ...**

APOTEKO J. B O N G E
— LA LOUVIERE —

La "MINIPIANO" BRASTED

PREZENTATA
DE
**GUSTAVE FAES**
Schoenmarkt, 16
Marché aux Souliers
ANTVERPENO
KOSTAS
Fr. 4.400,—



Gustumu la bonegan
**YOUGHOURT "NUTRICIA"**
- ĉiam freŝan. -
Produktoj por ĉiuj dietoj, por plenkreskuloj kaj infanoj. Ĝenerala Deponejo:
Sta Jakob-strato 8, BRUĜO.

**CREMERIE DE DIXMUDE**
F-ino M. M. MESTDAGH
St. Jacobstr., 8, rue St. Jacques
BRUĜO.
Specialajoj: Butero de Dixmude, Ovoj, Fromaĝoj — Tel.: 318 52

OSTENDO — BELGUJO
**HOTEL VROOME**
*RENDEVUO DE LA ESPERANTISTOJ*
20, BULVARDO ROGIER. — Tel.: 37.

**BELGA MARBORDO**
**Grand Hôtel d'Oostduinkerke**
Bone konata de multaj Esperantistoj.
**P. BENOIT, Delegito de U. E. A. Posedanto**

**HOTEL DU CORNET D'OR**
2, PLACE SIMON STEVIN (BRUĜO)
Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista (Reĝa Societo).
— Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj. —
*Oni parolas Esperanton. — English spoken.* DS (106)

**"GEVEA" SAPO...**
bonega sapo...
do: VIA sapo!
mendu ĉe:
**G. VERMANDERE**
Wetstraat, 15, Antverpeno

## ESTRARO DE „BELGA LIGO ESPERANTISTA"

**Prezidanto:** D-ro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie, Uccle. (Tel.: 44.53.00.)

**Vicprezidantino:** F-ino Yvonne Thooris, 4, Wijnzakstraat — Rue de l'Outre, Bruĝo. (Tel.: 320.86.)

**Vicprezidanto:** S-ro Maurice Jaumotte, 44, Avenuo De Bruyn, Wilryck (Antverpeno). (Tel.: 777.58.)

**Sekretarioj:** S-ro Ch. Poupeye, 42, Elf Julistraat, Bruĝo.
S-ro R. Dechesne, 38, Rue de la Meuse, Sclessin.
S-ro Swinne, 77, Rue Nieuwenhove, Uccle.

**Kasisto:** S-ro André Tassin, 1, rue St Joseph, La Louvière.

**Por pagoj de kotizoj, anoncoj, abonoj kaj donacoj:**
P.Ĉ.K. 1337.67 de Belga Ligo Esperantista (La Louvière).

**Por pagoj al I. E. L.:**
grupanoj al la P.Ĉ.K. de sia grupo;
izoluloj al la P.Ĉ.K. de Belga Ligo
Por ĉiuj aliaj rilatoj pri I.E.L. sin turni al: S-ro G. Van den Bossche, teritoria sekretario. Rembrandtstr., 7, Antverpeno.

**Por pagoj al Belga Esperanto-Instituto:**
P.Ĉ.K. 1689.58, Antverpeno (Lange Leemstraat, 127).

Presejo de BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, Koopera Soc., Lange Leemstraat, 127, ANTVERPENO.